

Prezidanto: Jan Bemelmans: jan.bemelmans2@gmail.com

Sekr./kasisto: Rob Moerbeek: RobMoerbk@proton.me

Kotizo: 5 eŭroj por A-landoj; 3,50 por B-landoj. UEA-konto: tade-t

Karaj legantoj,

Morgaŭ startos la 11-a “Stoptobro”, fumĉesa kampanjo por oktobro. Gazetoj atentis la celadon kaj la kontraŭulojn: industri-lakeajn politikistojn de la populara “Kamparana-civitana Partio” BBB.

Eĉ dupaĝan artikolon ricevis la batalo kontraŭ la e-cigaredo, kiun uzas unu el tri infanoj. Kiel do atingi ke en 2040 fumu maksimume unu el dek plenkreskuloj kaj neniu komencu sin nikotini?

(Bona okazo por honori la Internacian Tradukttagon.)

La nederlandan celon de senfuma generacio 70 organizaĵoj subskribis en 2016, gvidate de la kontraŭkancera Reĝin-Vilhelmino-funduso, la Kor-fondaĵo kaj la Ministerio pri Popolsano. Jare frumortas 19 000 fumintoj, kaŭzante damaĝon de 30 miliardoj da eŭroj, al kiom necesus aldoni pliajn malsankostojn kun labordeficitoj. Sed tio instigis ankaŭ la tabakistojn trovi kompensan enspezrimedon, ĉi-foje koste de junuloj. La e-cigaredoj ja allogas naivulojn per belaj koloroj, odoroj, formoj, milda fumsuĉo, revado.

Kaj tiuj politikistoj argumentas, ke akcizaltigo nur prirabas la ŝtatan kason je gravaj enspezoj, ĉar la tabakajvendoj rimarkinde regresis. Krome, oni aĉetadas en eksterlando, kie la prezo de cigaredoj konsiderinde malplias. Tio validas pri Germanio, ĉar Belgio pli atentis la sanon de siaj loĝantoj, malpermesante eĉ e-cigaredojn.

Nederlando en aprilo altigis la akcizojn pri tabakaĵoj, unuafoje ekde 5 jaroj. Sed la rezulto ja estas konstatabla. Malpli sukcesas digi la interretan malleĝan vendadon. Infanoj per Snapchat, Tiktok... povas mendi la ekde julio malpermesitajn fruktogustajn e-cigaredojn por vaporumado. Ene de kvaronhoro oni liveras ĉeporde.

Kontrabandaj cigaredoj estas eĉ pli danĝeraj: nekontrolitaj pri la kvalito.

Tiom pli intense konsciaj edukistoj konsilas la gepatrojn atenti la konduton de siaj infanoj. “Ne kredis ke via infano ne kaŝvaporumas. Tamen ne rekte malpermesu, sed parolu plej eble frue post la konstato, ke ekz. troviĝas malplenaj unufojaj vaporumiloj en tirkesto. (Iu patrino trovis 17 tiajn ĉe sia filino 14-jara.) Trovu taŭgan momenton, ekzemple aŭtoveture por demandi ne kvazaŭ policisto, sed kun sincera interesiĝo: “Oni multe parolas pri e-cigaredoj: kion vi mem opinias prie? Ĉu vi mem jam foje trovis tiajn fumaĵojn?” Ktp. Oni publikigis libron pri tio.

Nur poste doni vian propran opinion: atentigu pri la nikotino kaj metaloj kiuj atakas la spirorganojn, sed ankaŭ la cerbon. Kaj ke fakte multaj transiras al danĝeraj tabakcigaredoj.”

Infanoj rakontas, ke la tuto aspektas tute sendanĝera kaj ili nenion sentas en la gorĝo, kiel ja ĉe vera cigaredo (mildigon efikas certaj nikotinsaloj). Estas malfacile kalkuli la fortecon de unu kartoĉenhavo. Kaj ekzistas tia kiu ebligas 20 000 enhalojn, sed ankaŭ malpli pezaj e-cigaredoj enhavas multe pli da nikotino ol paketo da cigaredoj.

En la nuna semajno aperis intervjuo kun patrino kaj filo (14-jara), kiuj decidis ĉesigi sian fumadon. Ŝi jam provis dekfoje, sed ĉiufoje ŝi notas la plian obstaklon kiu recidivigis ŝin: festeton, ĉagrenighon, laborstreson, seniluziiĝon... Tamen nun ŝi nepre volas doni la bonan ekzemplon al sia filo. Kaj ili scias: se ili foje “glitfalias”, ne senkuraĝiĝi, sed provi plu.

Gravas difini la startodaton (por multaj la unuan de oktobro, sed la apoga aplikaĵo por saĝtelefono funkcios ĝis la fino de oktobro). Kaj post la unua senfuma tago nepre iom dorloti la infanon aŭ sin, kaj same laŭetape dum la 28 tagoj, post kiuj la tentado reduktiĝas al kvinono. Provinde! Kaj neniam ĉesi esperi.

Kun kora saluto,

Rob.